

Etnismo

N-ro 97

INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

30.06.2016



Honduraso:

Berta Cáceres murdita

pro sia batalo cele al Homaj Rajtoj,
protekto de la naturmedio kaj rekono de la
lenka popolo, p. 16

EN TIU ĈI NUMERO:

- Eldonista letero
p. 3
- La itala lingvo en
Svislando
p. 4 – 7
- *Ismail Beşikçi*, unua
turko, defendanto de
kurdoj, gasto en Laŭzano
p. 8 – 11
- Teritoria reformo en
Francio, laŭ bretona
rigardo
p. 12 – 15
- *Berta Cáceres*, murdita
pro sia batalo
p. 16 – 17
- Miaj spertoj pri la rejna
frankona lingvo
p. 18
- Koncize el ...
p. 19
- IKEL-informilo no 77 p. 20

Fotoj sur kovrilpaĝo:

Granda: el Vikimedio,
aŭtoro: *Chixoy*, 19.04-2016.

Malgranda en la angulo:
el www.theguardian.com,
aŭtoro *Johan Ordóñez/AFP/Getty Images*

Informilo pri etnaj problemoj

La membroj de la **Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)** ricevas *Etnismo*-n sen krompago, normale 2 kajerojn de minimume 36 paĝoj. Unuopa ekzemplero (de simpla numero) kosta 5 €. La artikoloj publicitaj en *Etnismo* ne nepre esprimas starpunkton de IKEL, se ili ne estas subskribitaj ĝianome. Ĉiuj eroj de la **"IKEL-Informilo"** estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honorarion. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti kontribuojn.

ESTRARO:

PREZIDANTO: Alain FAVRE (savoĵano),
Damo de Vi, allée du Quart d'Amo 171,
FR-74140 Chens-sur-Léman, tel: ++ 33 450 94 02 08,
retadreso: afavre1@hotmail.com; etnistoj@bigfoot.com
TTT-ejo: <http://ikel.stel.net>

VICPREZIDANTO KAJ REDAKTISTO:

Nicole MARGOT (vaŭdanino),
ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne
tel: ++ 41 21 653 14 67, retadreso: n.margot@bluewin.ch

SEKRETARIO: Nikolas XIL CARVALHO (asturleono),
48 postakutxa. 20400 Tolosa. Gipuzkoa. Eŭskio/EH
tel: ++ 34 630 44 68 63,
retadreso: fokomelo.makolji@gmail.com

KASISTO: Xabier RICO ITURRIOTZ (eŭskio),
Manuel Iradier, 22-1-ezk. ES-01005 Gasteiz
Euskal Herria-Eŭskio
retadreso: xabirico@outlook.com

RILATOJ KUN ESPERANTO-GAZETOJ. REVIZIADO:

István ERTL (hungaro), 22, rue Faulfiels
LU-7355 Helmdange, Luksemburgio,
tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: istvan.ertl@gmail.com

ESTRARANO:

Hèctor ALÒS I FONT (kataluno), Mir pr. 15-55, RU-428024
Shupashkar, Ĉuvaŝio, Rusia Federacio
retadreso: h.alos@esperanto.cat

RETEJO: www.etnismo.org

FORUMO: etnismo@googlegroups.com

KOTIZOJ KAJ KONTOJ:

Kotizoj	eŭroj
Normala	20.00
Subtenanta	30.00
Rabatita	10.00

La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks)socialisma aŭ "tria-monda" lando, aŭ estas studento aŭ emerito.

Bonvolu ĝiri vian IKEL-kotizon **ekskluzive** al la konto de IKEL ĉe UEA (kodo: **ikel-y**) aŭ al unu el jenaj kontoj de:

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam):

- BELGA poŝtĝirkonto (pĝk) n-ro **000-1631831-97**

- GERMANA (Köln) pĝk n-ro **318291- 509**

BLZ 370 10050 IBAN:

DE51370100500318291509SWIFT PBNKDEFF

- NEDERLANDA pĝk n-ro **37 89 64**

IBAN: NL24PSTB0000378964, SWIFT PSTBNL21

- SVEDA pĝk n-ro **74374-0**

IBAN: SE9595000099604200743740,

SWIFT NDEASESS

- SVISA pĝk **12-2310-0** (Bulle)

Ĉiukaze indiku **"ikel-y"** kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certigi, ke via kompleta kotizo alvenu al la IKEL-konto: IKEL absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko- aŭ peradkostojn!

Eblas reklami en *Etnismo*!

Anonctarifo: (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6

Venonta redaktolimdato:

31-an de septembro 2016

ELDONISTA LETERO

“Vero kaj repaciĝo” – sed nek pardono nek forgeso. Kaj, pli juste, riparo.

Komisionoj pri “vero kaj repaciĝo” (*truth and reconciliation* en la angla, *vérité et réconciliation* en la franca) kunvenis kaj plu kunvenas, foje sub iom malsamaj nomoj, en landoj, kie okazis gravaj konfliktoj, malrespektoj al homaj rajtoj, eĉ amasmurdoj ĝis vera genocido, kiel en Ruando. La celoj de tiuj komisionoj estas unue ekkoni/diskonigi la veron pri tio, kio okazis, kaj agi tiel, ke la komunumoj koncernataj de la konflikto povu (denove) kunvivi: oni fakte celas la reunuiĝon de lando, kiu riskus “eksplodi” pro la graveco de la eventoj kaj pro la malamo, kiu estiĝis inter la du (aŭ pli) komunumoj. Oni povas imagi, ke en tio gravas amnestio. Foje eĉ murdintoj ricevas tre mildan punon, se entute punon ili ricevas: ofte sufiĉas, ke iu persono agnosku sian kulpon, sian partoprenon en la fiagado, kaj li/ŝi rajtas daŭrigi sian kutiman vivon. El la flanko de la viktimoj, multaj malfacile eltenas tian indulgon, sed oni jam delonge diras, ke la tempo estas la plej bona repacigilo. Tre ofte la registaro helpas al repacigo, la historiaj manlibroj eĉ ne plu parolas pri tiuj aferoj, tiel ke la posteuloj emu forgesi, aŭ havu tre malklaran ideon, pri tio, kio okazis entute.

Kvankam mi ne faris historian esploradon, ŝajnas, ke la ekzemplo de Sud-Afriko, antaŭ dudeko da jaroj, estas la unua pri la funkciado de tiaj komisionoj. Temis pri la krimoj de la apartismanoj – sed ankaŭ de homoj, kiuj perforte rezistis al tia apartigismo –, kaj la fama sacerdoto *Desmond Tutu* prezidis la komisionon. Sufiĉis do, ke akuzitoj pri krimoj konfesu sian kulpon, por ke neniuj puno okazu. Sed fakte tiuj, kiuj ne konfesis, entute ne estis ĝenitaj, pro “nesufiĉo de pruvoj” – plejofte ĉe la “blankula” flanko.

Ĉar, kompreneble, obstakloj ekzistas. Sed foje ili venas el unuavide plej bonaj intencoj. Ekzemple iom modas nun paroli pri pardono. Sed kiu rajtas pardoni? Antaŭ nelonge, la katolika eklezio petis pardonon de la valdanoj, religia grupo protestanta, kiu ekestis jam en la mezepoko kaj estis dumlonge persekutita, (vidu *Etnismo*-n n-ro 73, p. 11 “Valdanoj: ĉu etnanoj, ĉu religianoj?”); tiuj ĉi rebatis, ke ili ne povas respondi por siaj antaŭuloj, kiuj estis la viktimoj. Estus ja tro facile paroli nome de tiuj, kiuj suferis, eĉ mortis, kiam tiuj persekutoj ne plu estas aktualaj. Kaj pardono povas foje signifi manipulado: en Ruando la (diktatoreca) povo planas, ke okazu grupa pardonpeto de la hutoj al la tucoj, kvankam multegaj “moderaj” hutoj estis masakritaj. Tio des pli strangas, ke en tiu lando oni pretendas, ke la distingo inter la du grupoj ne plu ekzistu.

Ni jam elvokis forgeson. Sed ĉu ĝi vere povas okazi? Eventojn oni provas enterigi, sed en iu momento ili reaperas surface, ofte deformitaj, en malfacilaj kondiĉoj, ekspluatite de iuj politikistoj, kaj tial nova socia bombo povas eksplodi.

Konkluda demando, iom maltrankviliga: ĉu entute komisiono “vero kaj repaciĝo” povas efike funkcii? Eble. Ĵusa ekzemplo koncernas la indiĝenojn de Kanado, kies infanoj estis forprenitaj kaj metitaj en edukejojn, kie ili devis tute forgesi sian devenan kulturon, do rompi ĉiajn rilatojn kun la gepatroj. Tio kondukis al tre malmultaj sukcesoj de integriĝo en “okcidenta” socio kaj al tre multaj traŭmatoj, fizikaj kaj psikaj, al “deviaj” sintenoj kun diversaj dependecoj, al multnombraj sinmortigoj kaj al malfortigo, eĉ fakta malapero, de etnoj. Post abundaj enketoj, atestoj kaj renkontiĝoj, la komisiono alvenis al fina raporto (decembre de 2015) sufiĉe ampleksa, kiu tuŝas ĉiujn kampojn de la individua, ekonomia kaj socia vivo, kaj entute celas al respekto de la indiĝena homo, de ties lingvo kaj kulturo, eĉ ilin redonante al tiuj, kiuj pro perforto perdis ilin. Jen interesa ekzemplo, por ne diri modelo, kiam oni scias, ke fakte tre multaj ŝtatoj aplikas tiun tipon de misedukado, de mistraktado de malplimultanoj. Kanado – pli ĝuste ties nova, “moderna” registaro – montris justan vojon, ni nur esperu, ke aliaj kuraĝos ĝin sekvi.

Alain Favre

LA ITALA LINGVO EN SVISLANDO

Magistrecala laboro en Ĝeneva Universitato



Vikimedia, aŭtoro supozata: *Mathein*.

Bivio/Beiva kun la Julia Pasejo en la fundo.

ENKONDUKO


La universitato de Ĝenevo – dua urbo de Svislando laŭ la nombro de loĝantoj – posedas tiel nomatan *Faculté de traduction et d'interprétation* (fakultato pri tradukado kaj interpretado), kiu liveras universitatan magistrecon pri la angla, la araba, la franca, la germana, la hispana, la itala kaj la rusa. *Anton Velleman* (1875-1962), fakulo pri la romanĉa, honora civitano de Zuoz [vilaĝo de Alta Engadino, en Grizono - NdT] kaj tradukisto por la Ligo de Nacioj, fondis en 1941 la Ĝenevan Lernejon por Interpretistoj, kiu fariĝis universitata fakultato en 2011. Tiu ĉi atribuis en 2015 la supre menciitan magistrecon al la tiĉina studentino *Elisa Pestoni* pro ŝia laboro pri la itala en Svislando (2). La enkonduka resumo diras: «La antaŭenigo de la itala en Svislando, samtempe nacia, oficiala kaj minoritata lingvo por 8% de la loĝantaro, staras meze de la nuna debato pri plurlingveco, (...) ne nur en la kantono Tiĉino, sed ankaŭ en Grizono. Tiu ĉi laboraĵo ekzamenas la instituciajn paŝojn faritajn lastatempe

por plifortigi la pozicion de la itala en Svislando, (...) la multenombrajn iniciatojn fare de pluraj asocioj por defendi la italan kaj ĝian konservadon kiel L2 [studebla kiel dua lingvo en lernejo - NdT] en la tuta lando.» Sekvas inventaro, kiu substrekas, kion oni faru kaj kion oni devus rememorigi por antaŭenigi la italan en la romandaj kaj alemanaj kantonoj.

NUNA SITUACIO

En sia antaŭparolo la aŭtorino raportas pri la granda miro de ĝeneva klaso pro tio, ke ŝi tuŝis la temon de itالparolanta Svislando: «Ili vere sciis tre malmulte».

Unua demando: Kiom firma estas la itala lingvo en Svislando? «8,3 % en 2013, (...) tio estas 312 000 homoj en la itallingva Svislando (...) kaj 330 000 aliloke. La kantono Tiĉino havis 346 539 loĝantojn en 2013. La antaŭparolo de ĝia konstitucio substrekas, ke ĝi estu «fidela je sia historia tasko reprezenti la italan kulturon en la Konfederacio.» La unua artikolo difinas tiun kantonon kiel «demokratian respublikon lingve kaj kulture italan». La itallingvaj valoj de Grizono havas proksimume 13 000 loĝantojn; en la tuta kantono estas ĉirkaŭ 19 000 itالparolantoj. «Nur antaŭnelonge Grizono klare agnoskis, ke la romanĉa kaj la itala estas endanĝerigitaj lingvoj, kiuj bezonas protektadon.» La aŭtorino mencias la «stabilan situacion de la itala en *Beiva* [itale *Bivio*, eta vilaĝo de Grizono, iam plejmulte itallingva sed oficiale germaniĝinta en 2005 - NdT], danke al la elementa lernejo, kiu donas prioriaton al peritala instruado.



Sudorienta parto de Svislando. En la malhelaj grizaj partoj, la itala parolatas en siaj propraj etnaj areoj.

Daŭre troviĝas «tute fuŝaj tradukoj. Ili ŝajnas montri, ke iuj privataj entreprenoj ne multe respektas la trian nacian lingvon (...). Ekzistas neniu devigo (...) rilate la kvaliton de la tradukoj en naciajn lingvojn (...). En Kebekio, pro tre preciza kaj klara leĝaro, la situacio tute malsamas.» En 2010 la italoj reprezentis 16 % de la eksterlandanoj. «La itala konsulejo donas kursojn pri la itala lingvo kaj kulturo al la infanoj de enmigrintoj dum la tuta sinsekvo de lernojaroj; tio estas esenca por konservi kaj profundigi ilian konon de la itala. Tion komprenas la ŝtataj lernejoj; ili registras la rezultojn en la atestoj kaj faciligas ĉeesti tiun instruadon, se ĝi okazas kadre de la lernohoroj.». La enmigrintoj de alia deveno, ekzemple portugala kaj hispana, bezonas la italan kiel pontlingvon, aparte en la alemanaj kantonoj: «Por ili estas tre malfacile lerni la germanan pro la diglosio inter la dialekto kaj la oficiala lingvo; male ekzistas itallingvaj amasmedioj en tuta Svislando.»

LINGVA POLITIKO FEDERACIA (3)

La dua ĉapitro de la laboraĵo temas pri politiko: «La plurlingveco de Svislando estas ŝtatnivela (...): la ŝtato agnoskas la ekvivalentan dignecon de ĉiuj naciaj lingvoj, ĉiu parolata en sia propra areo far etnaj grupoj geografie disigitaj (...). La plurlingva svisa teritorio entenas unulingvajn regionojn (...). Ĉiu nacia lingvo estas ligita al sia propra teritorio tradicia, sed estas apenaŭ leĝe protektita ekster tiu teritorio, kaj la kompetento ĝin instrui koncernas la unuopajn kantonojn.» Tie la aŭtorino resendas al publikigaĵo de *Sacha Zala* (Berno), historiisto devenanta el *Brusio* (itallingva parto de Grizono) kaj prezidanto de *Pro Grigioni Italiano* ĝis 2014. *Zala* substreki la paradoksan kontraston inter la italaj infanoj en Berno, kiuj frekventis la kurson aranĝitan de sia konsulejo, kaj liaj propraj gefiloj, svisaj civitanoj, senigitaj de svisa lernejblo en la nacia lingvo, kiun ili uzas en la familio. *Romedi Arquint*, antaŭa prezidanto de *Lia Rumantscha* [Romanĉa Ligo – asocio, kiu oficiale defendas la romanĉajn lingvon kaj kulturon - NdT], denuncas la «teritorian enkarcerigon de la lingvoj (4)» (Vidu *La Quotidiana*, 11/11/2014). *Elisa Pestoni* notas, ke la artikolo 70 de la federacia konstitucio «nepre temas pri konservo kaj antaŭenigo de la romanĉa kaj itala, (...) do pri protektado de tiuj minacataj lingvoj.» Krome Svislando ratifis la Eŭropan Ĉarton por Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj, «antaŭenigas la romanĉan kaj italan en tiu senco» kaj plenumas la Bazan Interkonsenton por Protektado de Naciaj Minoritatoj favore al siaj tri latinidaj komunumoj. La federacia delegacio por dulingveco «kontrolas la konservadon kaj la aktivan antaŭenigadon de plurlingvismo». La leĝo pri la publikigo en la tri oficialaj lingvoj «preskribas, ke oni povu ĝenerale aliri samtempe en tiuj lingvoj la

publikigojn de la Konfederacio.» Krome la federacia kancelario havas konsilanton por la lingva politiko. La Federacia Oficejo pri Kulturo «intencas antaŭenigi la instruadon de la itala ekster la itallingva Svislando (...) por protekti la kulturan plurecon, kiu plifortikigis Svislandon kaj estas la fundamento de nia nacia kuneco». «La federacia administracio pliigas la oferton de kursoj por sia dungitaro.»

AGOJ POR DEFENDI LA ITALAN

La tria parto de la laboraĵo estas dediĉita al iuj iniciatoj por antaŭenigi la italan en Svislando. Ni citu nur la plej rimarkindajn ekzemplojn: «La Universitato de la Itala Svislando sin devontigas ekde 2012 por la instruado de la itala en Svislando. Ĝi organizas lingvajn restadojn por gimnazianoj el aliaj kantonoj, kun instrueroj de itala lingvo kaj kulturo de la itala Svislando». *Pro Grigioni Italiano* naskiĝis en 1918 en Koiro por kompensi en iu formo la mankon de teritoria unueco kaj «por defendi la interesojn de la itala malplimulto en Svislando (...). Ĝi reprezentas la itallingvan Grizonon ankaŭ en la Konsilio de Eŭropo pri lingvaj demandoj». «La ĝenerala konsulejo de Italio donas kursojn pri la itala lingvo kaj kulturo en diversaj urboj svisaj dum la tuta lernotempo.». Krome ekde 2014 ekzistas instrurimedo tre originala, kiu celas «disvolvi la kapablon kompreni la italan, en rilato kun la franca kaj parte eĉ kun la germana, kaj samtempe informi pri la itallingva Svislando.» La manlibro, titolita «*Capito? Comprendere l'italiano in Svizzera*» estis publikigita de *Osservatorio linguistico della Svizzera italiana (Bellinzona)* kun la helpo de la universitatoj de Berno kaj Friburgo. La aŭtorinoj estas *Elena Maria Pandolfi*, *Sabine Christopher* kaj *Barbara Somenzi*. La federacia administracio utiligas tiun manlibron en kursoj destinitaj al ĝiaj dungitoj. «Ĉiuj personoj, kiuj partoprenis en tiuj kursoj, opinias, ke ili komprenas nun la italan pli facile.»



INSTRUA FAKO

La aŭtorino dediĉas sian kvaran ĉapitron al la itala kiel instrua fako precipe en la gimnazioj: «Instrui la naciajn lingvojn en Svislando estas problemo tre aktuala, ĉar pluraj kantonoj emas nun favori la an-

glan.» *Elisa Pestoni* raportas unue pri Grizono: «Ekde la lernojaro 1999/2000 la itala estas instruata kiel dua lingvo en la elementaj lernejoj germanlingvaj de Grizono, ekde la tria klaso (...). En 2013 oni provis kontesti tiun instruadon per “popola iniciativo” (5) titolita «Nur unu fremda lingvo en la elementaj lernejoj» (anstataŭ du). La “iniciativo” pretendis antaŭ ĉio, ke la angla estu la ununura fremda lingvo en la unuagradaj lernejoj de la germanlingvaj regionoj (...). La oponentoj al la “iniciativo” opiniis male, ke tiu ĉi diskriminacias la minoritatojn kaj malrespektas la federaciajn leĝojn same kiel la kantonan konstitucion. Dum la decida sesio de la Granda Konsilio la 20an de aprilo 2015 la deputito *Reto Cramer* difinis tiun iniciaton «fronta atako kontraŭ la trilingveco» de la kanto. Tiam la Konsilio deklaris la iniciaton nula per 82 voĉoj kontraŭ 34 (...). Tiu simbola epizodo montras, ke multaj rigardas la italan, nacia lingvon minoritatan, kiel malpli gravan ol la anglan, kaj tio okazas eĉ en parte itallingva kanto.» (7)



Vikimedia, aŭtoro: *Jorgengb*.

Posiavo (Grizono): restoracia ŝildo en la lombarda.

PRI GIMNAZIOJ

«La svisa konferenco de kantonaj direktoroj de la publika instruado notis, ke oni devas ĉiurilate plifortikigi la instruadon de la itala en gimnazioj (...). En 2013 nur 13 % de la gimnazianoj elektis sekvi kursojn de la itala (...). Tio estas tre malmulte por lingvo nacia kaj oficiala. La konferenco opiniis, ke ĝi devas formuli rekomendojn tiurilate. Tion ĝi faris la 26an de marto 2015 (...). Dum la lastaj jaroj pluraj kantoj aŭ gimnazioj volis forigi la italajn kursojn aŭ almenaŭ ilin redukti (...) pro la malalta nombro de aliĝoj. La unua ideo koncernis la italan kiel


abituriantan temon: la kantoj sin devontigu tiel, ke ĉiu gimnaziano povu sekvi la instruadon (...). La gimnazioj, kiuj ne povas proponi tiun instruadon, trovu solvon per aliaj gimnazioj situantaj je eltenebla distanco de la loĝloko (...). La dua rekomendo instigas la kantojn organizi la instruadon de iuj fakoj en la itala (...). La lasta volas peti, ke la kantoj kaj iliaj gimnazioj apelaci al federacia helpo por trovi mem manierojn antaŭenigi la italan.»

POR EVITI LA GERMANAN

La aŭtorino raportas poste pri duagradaj lernejoj en Ĝenevo kaj Vaŭdo: «Ĉiu ŝtata lernejo de la ĝeneva kanto proponas instruadon de la itala: gimnazioj, lernejoj pri ĝenerala kulturo, komercaj kaj profesiaj lernejoj (...). Ekde septembro 2015 la Departemento pri publika instruado, kulturo kaj sporto organizas kursojn de la itala ĉiun merkredon posttagmeze (...). Poste venas la multnombraj ebloj lerni la italan kaj perfektigi: kursoj de la konsulejo, de *Società Dante Alighieri*, de privataj lernejoj, de la gimnazio *Pareto* (en Vaŭdo), «kiu pretigas samtempe al franca *baccalauréat* kaj al la itala *esame di stato*.» En la kantona gimnazio Ĝenevo (kvar jaroj) oni devas elekti inter la itala kaj la germana antaŭ ol povi lerni la anglan. «Oni do akiras fundamentajn nociojn de la lingvo kaj kulturo de Italio kaj de la itallingva Svislando.» Oni ofte elektas la italan, ĉar ĝi aspektas pli facila ol la germana, despli, ke oni originas de familio itallingva aŭ venanta el lando (Francio, Portugalio, Hispanio), kie oni ne lernas la germanan en la elementa lernejo. La aŭtorino petis de dek instruistoj de la itala, ke ili faru siajn didaktikajn rimarkojn: «Ili estas preskaŭ unuanimaj: iliaj lernantoj scias nenion aŭ nur malmulte pri la itallingva Svislando. Ili rilatigas plejofte nur Italion al la itala lingvo (...). La homoj en Ĝenevo nur malmulte vizitas la itallingvan Svislandon (...). Iu instruisto raportis, ke li antaŭe laboris en la kanto Friburgo, kie li konstatis diferencon: la friburganoj ŝajne pli bone konas la italparolantan Svislandon.

MANLIBRO POR SEMAJNA KURSO

La «apendico D» (aldonaĵo) de la laboraĵo titoliĝas «*Italiano subito*» [la itala tuj]. La *Scuola universitaria professionale della Svizzera italiana* (SUPSI, dfa.rec@supsi.ch) ellaboris «intensivan kurson enkondukan al la itala por tutkomencantoj, kiuj frekventas duagradajn lernejojn en alemanaj regionoj. La baza ideo (...) estas, ke eĉ minimuma scio povas jam favori la nacia kunecon kaj igi malpli abstrakta la koncepton de kvarlingveco (...). En semajna laboro per tiu manlibro oni do volas proksimigi lernantojn al la itallingva Svislando kaj konsciigi ilin, ke ĝi estas esenca elemento de la plurlingva identeco de la lando (...). Temas pri propono de pozitiva renkontiĝo kun la



El la reta gazeto *Il Bernina*.
<http://mybernina.ilbernina.ch/>

La premio de la
Pro Grigioni Italiana,
Il Cubetto PGI 2015
 (la kubeto),
 asignita al la aŭtoro de
 tiu ĉi artikolo,
Guü Sobiela Caanitz

itala (...) kiel semajna projekto aŭ lernejtendaro. Konklude al sia laboro, la aŭtorino do prezentas instrurimedon kun la celo antaŭenigi la studadon de la itala norde de la Alpoj. En sia tria ĉapitro ŝi jam analizis «*Capito?*» [Komprenite?], manlibron ellaboritan por helpi kompreni tiun nacian lingvon: «Ĝi uzas la saman metodon kiel «*Chunsch druus?*» [Ĉu vi komprenas?], instrumentado por la alemanaj dialektoj. La berna eldonentreveno *Schulverlag* (info@schulverlag.ch) substrekas, ke «*Chunsch druus?*» entenas «nunajn aŭdektstojn kaj ĉiutagajn dialogojn en diversaj idiomoj». Oni povus do ellabori samspecan manlibron, titolitan ekzemple «*Enclegias?*» [Ĉu vi komprenas?], kiu helpu kompreni la romanĉan per tekstoj en diversaj idiomoj kaj en *rumantsch grischun*, oficiala lingvo de Grizono kaj de la Konfederacio. *Elisa Pestoni* memorigas plurfoje, ke la romanĉa estas minacata lingvo; cetere ŝi tre bone atingas sian celon analizi la varian situacion de la itala en Svislando. Vere necesis klare rimarkigi, ke oni devas informi la junularon pri la itallingva Svislando. Sed la itala estas ankaŭ la lingvo de najbara lando kun preskaŭ 61 milionoj da loĝantoj kaj portilo de miljara kulturo, kiu profunde influis la nian. La novaĵoj, kiuj venas el Italio, ne ĉiam estas pozitivaj, sed taŭgas memori pri tiuj, kiuj estas tiaj. Ekzemple la itala leĝo 482, valida ekde la 15a de decembro 1999, agnoskas kaj protektas la lingvojn, precize cititajn, de dekdu etnaj minoritatoj (5) kaj iliajn historiajn kulturojn, kiuj «harmonias kun la principoj fiksataj de la eŭropaj organizoj» (art. 2). Tio estas parto de la nuna itala kulturo: oni instruas la lingvojn de minoritatoj, kie la lokaj familioj ilin uzas. Ankaŭ en Svislando oni elturniĝas pli kaj pli bone por instrui la romanĉan kaj la italan, kie troviĝas diasporoj de tiuj lingvoj. La 26an de februaro la Instituto pri Plurlingveco de la Friburga Universitato organizos kolokvon pri lingvo kaj teritorio (barbla.etter@unifr.ch; v. *La Quotidiana* de la 6a de januaro). Tie oni pridiskutos tiajn demandojn.

Notoj:

(1) La aŭtoro de tiu ĉi artikolo estis rekompensita en 2015 de la Asocio *Pro Grigioni Italiano*, de la premio *Cubetto* «pro sia subteno kaj pro sia konstanta engaĝiĝo por informi pri la situacio de la itala lingvo, inter alie per sciencaj kontribuoj en la *Quotidiana*.»

(2) E. P., *L'italiano in Svizzera: più lingua nazionale o più lingua di minoranza? Politiche linguistiche, iniziative in sua difesa e modalità d'insegnamento*. Ĝeneva Universitato, 2015. (<http://archive-ouverte.unige.ch/unige:75639>)

(3) Vidu *Etnismo*-n no 93, Svislando: 4-lingva, 5-lingva, aŭ pli...? p. 4 – 13.

(4) R. A., *Plädoyer für eine gelebte Mehrsprachigkeit*. Zuriko (NZZ, ISBN 978-3-03823-910-9) 2014, p. 12.

(5) Per “popolaj iniciativoj” la svisa popolo povas proponi leĝojn aŭ konstituciajn artikolojn je la federacia, kantona aŭ municipa nivelo. En la du kazoj necesas unue kolekti favorajn subskribojn (50 000 por referendumo, 100 000 por popoliniciativo).

(6) Post la apero de tiu ĉi artikolo la Administra Tribunal de la kantono Grizono nuligis la decidon de la Granda Konsilio kontraŭ la “popola iniciativo” «Nur unu fremda lingvo en la elementaj lernejoj» kaj la Asocio *Pro Grigioni Italiano* anoncis, ke ĝi apelacios al la Federacia Tribunal.

(7) Temas pri la albana, franca, francprovenca, friula, germana, greka, kataluna, kroata, ladina, okcitana, sarda kaj slovena. Iuj lingvoj tamen estas ekskluditaj de tiu leĝo, i. a. la «norditalaj» aŭ «padiaj», kiel la piemonta, la lombarda kaj aliaj. (NdT)

Elromanĉigis *Alain Favre*

Artikolo aperinta en *La Quotidiana*, la 18.02.2016
 kun la titolo: *La lingua taliana en Svizra*.

ISMAIL BEŞİKÇİ, Unua turko, defendanto de kurdoj, gasto en Laŭzano

La 13an de februaro 2016 estis anoncita prelego de *Ismail Beşikçi* en Laŭzano (en la svisa vaŭda kantono), “Milito kaj paco en Mezoriento: kiujn demokratajn solvojn al la kurda demando?” La prelego okazis en la Palaco *Rumine*, en la salono mem, kie estis subskribita la traktato de Laŭzano, la 24an de julio 1923, traktato, kiu rifuzis ŝtaton al la kurdoj. La salono plenis, ĉefe de kurdoj ŝajne. La municipa konsilanto, *Grégoire Junod*, kaj *Ada Mara*, vaŭda deputito en la svisa parlamento, malfermis la eventon. *Grégoire Junod*, socialisto, rekonis kun malfeliĉo, ke la nomo de Laŭzano estas ligita al evento malfavora al la kurdoj kaj esprimis la engaĝiĝon de la urbo por la aŭtonomio de la popoloj kaj sian personan malkvietiĝon pri la nuna turka politiko kontraŭ la kurdoj. Ankaŭ membro de la socialisma partio, *Ada Mara* bedaŭris la mankon de voĉoj por protesti kontraŭ la turka agado kaj la subtenon de Eŭropa Unio al Turkio pro ties rolo de barilo kontraŭ alveno de rifuĝintoj en la Union. «La demando pri kreo de kurda ŝtato aktualas, kaj la Socialisma Partio Svisa solidaras kun tiu ideo, kiu koincidas kun la pozicio de granda parto el la civiluloj en Turkio».

Sekvis diversaj alparoloj kaj longa prelego, bedaŭrinde nur en la turka, de reprezentanto de la Fondaĵo *Beşikçi*, *Ibrahim Gürbüz*, antaŭ la prelego de *Ismail Beşikçi*.



La municipa konsilanto, *Grégoire Junod*, esprimiĝanta en la palaco *Rumine*.

KIU ESTAS ISMAIL BEŞİKÇİ?

Turka klerulo, sociologo, filozofo, revoluciulo kaj verkisto (honora membro de *PEN Club* internacia), *Ismail Beşikçi* naskiĝis la 7an de januaro 1939 en la turka urbo *Iskilip*. Li studis en la Fako pri Politikaj Sciencoj en la universitato de Ankaro, kie li diplomi-



ĝis en 1962. Post militservo li fariĝis asista profesoro en la Universitato Atatürk en Erzurum. Tie li pretigis sian unuan antropologian studon, esploron pri unu el la lastaj nomadaj kurdaj triboj en 'Alī Kān. Tiun studon li prezentis en 1967 al la fakto de Politikaj Sciencoj de Ankaro kun la titolo "Göçebe Alikan Aşireti, La nomada tribo de Alī Kān. Alī Kān situas en la provinco Okcidenta Azerbajĝano, nordokcidente de Irano kaj proksime al la turka landlimo.


Lia dua renkonto kun kurdoj okazis dum militservo en Bitlis (kurde Bidlis), kaj Hakkâri (kurde Colemêrg), du turkaj urboj proksimaj al la orienta landlimo kun Irano, ĉefe loĝataj de kurdoj, kie li, la unuan fojon, vidis la nomadan tribon de Ali Kan trapasi Biltis okaze de someraj migradoj.

En sia libro *Doğuda Değişim ve Yapısal Sorunlar*, "Ŝanĝoj kaj strukturaj problemoj en la Oriento", publikigita en 1969, li provis adapti kaj konkretigi la marksismajn konceptojn en la analizo de la kurda societo koncerne sociajn-ekonomiajn kaj politikajn ŝanĝojn. Tiam li fariĝis publika malamiko por la turka registaro. Kvankam la libro ne vekis multajn debatojn, ĉu en sciencistaj ĉu en intelektaj rondoj, ĉu en la maldekstraj partioj, la universitato aplikis disciplinan agon al li, kiu kaŭzis verdikton kontraŭ li post la puĉo de 1971. Fine de 1974 li profitis de amnestio kaj estis liberigita. Vane li petis lokon ĉe la Fakultato de Politikaj Sciencoj de la Ankara Universitato, kiu en 1970 ŝajne pretis dungi lin. Li ne trovis postenon sciencan kaj de tiam dediĉis sin al esplorado kiel sendependa klerulo, en finance necertaj cirkonstancoj.

Dum multaj jaroj Ismail Beşikçi estis la sola nekurdo, kiu parolis la kurdan en Turkio, laŭte kaj klare defendante la kurdajn rajtojn. Malgraŭ ĉiuj provoj lin silentigi, li daŭre verkis kaj parolis kaj tiam fariĝis forta kaj grava simbolo por la kurda movado kaj por la homaj rajtoj en Turkio. Li estis kondamnita al 100 jaroj da karcero sed liberigita en 1999. En 1987 li estis kandidato por la Nobel-pacpremio. El la 36 libroj, kiujn li publikigis, 32 estis malpermesitaj en Turkio.

Lin oni priskribis kiel "modernan pioniron de la prikurdaj studoj en Turkio". En 2011 estis kreita en Istanbul fondaĵo je la nomo de Ismail Beşikçi. En 2010 rekomenciĝis la persekutoj kontraŭ li. Ĉi-foje la ĝenerala prokuroro de Istanbul akuzis lin pri propagando por PKK, *Partiya Karkerên Kurdistan* (Kurdistana Laborista Partio), kaŭze de lia artikolo "La rajtoj de la popoloj je memdetermino kaj la kurdoj", kiun li verkis por la Asocio de la Advokatoj Nuntempaj. En marto 2011 li estis kondamnita je 15 monatoj en malliberejo.

Li estis deklarita Homo de la Jaro fare de Rudaw Mitjana, grava retejo de kurdaj komunikoj bazita en



Vikimedia, 2014. Aŭtoro: Mutlu Çiviroğlu.

Ismail Beşikçi

Suda Kurdio (nun ne plu ekzistanta), por lia kontribuo al la kurda kaŭzo, inspirante aliajn lin sekvi.

Ismail Beşikçi verkis plurajn gravajn verkojn pri la socia organizo kaj la aktuala situacio de la kurdoj. La plej fama inter ili estas *Devletlerarası Sömürge Kurdistan*, "Kurdio, internacia kolonio", 1990. Beşikçi argumentas, ke la turka ŝtato praktikis politikon de genocido kontraŭ la kurdoj en la lastaj 80 jaroj. Tio estas verŝajne la kritiko plej aperta de Beşikçi pri la nuna divido de Kurdistan, etna areo disrompita inter Turkio, Irano, Irako kaj Sirio, kun milionoj da kurdaj loĝantoj. Beşikçi argumentas, ke, malgraŭ la politikaj diferencoj inter la ŝtatoj de la regiono, ekzistas inter ili malnova komplaceco nei la rajton de la kurdoj je memdispono kaj propra nacio.



Ankaŭ la kaŭzon de la armena popolo Ismail Beşikçi priatentas kaj subtenas. La 15an de septembro 2012 li ricevis la Internacian premion Hrant Dink el



El <http://www.zazaki.net>.

Ismail Beşikçi en la biblioteko de la Fondaĵo Beşikçi.

Fondaĵo kreita en 2007 iom post la tragika murdo de la samnoma turka ĵurnalisto armendevena (1). Tiu ĉi premio rekompencas individuojn aŭ grupojn, kiuj laboras, en kondiĉoj ofte danĝeraj, nome de iuj humanaj valoroj. Kaj la 19an de aprilo 2015 *Beşikçi* partoprenis al la unua rekono de la armena genocido en *Bitlis/Bidlis* organizita de la turka asocio pri Homaj Rajtoj. (2)

FONDAĴO BEŞİKÇİ

Oficiale registrita la 29an de novembro 2011, tiu fondaĵo havas kiel unuan celon transdoni al la homaro la kulturen heredaĵon de *Ismail Beşikçi*, lian fieran kaj firman pozicion favore al demokratio kaj al la popoloj. «En mondo, kie la kodoj humanismaj, sciencaj, kulturaj kaj etikaj degeneris, kie la konceptoj leĝo, justeco, demokratio kaj Homaj Rajtoj estas neataj kaj kie la oficiala ideologio silentigas tiajn demandojn per administraj kaj punaj sankcioj, kie etikaj kaj religiaj valoroj estas primokataj favore al la ŝtata povo, kie oni adoras monon kiel Dion al kiu la popoloj estas oferitaj, ni havas la respondecon kundiĉi la ideojn de *Ismail Beşikçi* kun tiu mondo kaj transdoni liajn verkojn al la venontaj generacioj». La fondaĵo celas ebligi sciencajn esploradojn sociajn kaj kulturajn danke al la arkivoj de *Ismail Beşikçi*, kolektitaj la lastajn sesdek jarojn. (3)

BEŞİKÇİ EN LA LOKAJ GAZETOJ

Du gazetoj de la Lemana regiono (ĉirkaŭ Laŭzano) intervjuis la turkan gaston antaŭ lia februara prelego. El ili mi citos kelkajn signifajn

diraĵojn liajn, sen forgesi, ke gravaj eventoj plu influis la mezorientan situacion ekde lasta februaro.

En la gazeto *24Heures*, *Ismail Beşikçi* klarigis: «La traktato de Laŭzano trudis la dividon de Kurdistanon kiel dividon de unu korpo. Hodiaŭ oni povas taksi je 50 milionoj la kurdojn en la mondo sed ili ĝuas nenian internacian rekonon. Ne akcepteblas, kiam oni pensas, ke etaj ŝtatoj kiel Monako aŭ Andoro membras en UN. Tamen ekde marto 2011 la kurdoj ekkontrolis sian regionon en Sirio. Tio kreis ekkonsciigon en la kurda popolo...»

En la gazeto *Le Temps*, kiu titolas sian artikolon:

“De Laŭzano al Laŭzano,

por sendependa Kurdistanon”, oni povas legi: «La tempoj ja ŝanĝiĝis, ĝojis *Ismail Beşikçi*. Temo kiel la kurda identeco estis tabua kaj tiuj, kiuj aŭdacis ĝin aliri, ricevis pezajn sankciojn, punajn kaj administrajn. Hodiaŭ ĉiuj povas paroli sen risko.» Kio kaŭzis tiun ĉi evoluon? demandis la ĵurnalisto. «La armila lukto de Kurdistan Laborista Partio (PKK), senhezite respondis *Ismail Beşikçi*. Pro ĝi malebliĝis nei la ekziston de kurda minoritato en Turkio.» Por *Ismail Beşikçi* la kurda lando devas sendependiĝi pro diversaj kialoj. La unua estas praktika. «Memmastrumado estas kondiĉo de prospero», asertas la esploristo. «Se la kurdaj regionoj estas hodiaŭ subevoluintaj en Turkio, tio ne signifas, ke en ili mankas riĉfontoj, tion nur kaŭzas la volo de Ankaro. Se tiuj regionoj volas elturniĝi, ili devas esti mastrumataj de la loĝantoj.» La dua estas afero de digno: «La manko de ŝtato psikologie malutilas», daŭrigas la sociologo. «Metu vin je la loko de la kurdoj kondamnitaj vivi sub aliula potenco dum ili estas dekoj da milionoj!» La esploristo volas kredi, ke la internacia komunumo estas hodiaŭ pli bonintencata. «La kurdoj estis la solaj, kiuj decideme batalis kontraŭ Daiŝo (la islama ŝtato)», argumentas li. «Ili estas ekde nun sentitaj multe pli pozitive far multajn ŝtatojn. Unu jarcenton post la traktato de Laŭzano, kiu rifuzis iun ajn ŝtaton al la kurdoj, la perspektivo de unua kurda tero skiziĝas en la nordo de Irako. Ĉu tiu projekto realiĝos? *Ismail Beşikçi* pensas, ke jes. Li eĉ konsideras, ke dank'al siaj energiaj fontriĉecoj la estonta ŝtato povos iel fariĝi modelo por ĉiuj kurdoj.» (4)

RAPIDA RIGARDO AL LA TRAKTATO DE LAŬZANO

Tiu traktato anstataŭis la traktaton de Sèvres, subskribitan tri jarojn antaŭe, la 10an de aŭgusto 1920, proksime de Parizo. Iniciatita de la sultano *Mehmet la 6a*, la lasta otomana sultano, ĝi devis doni aŭtonomion al la armenoj kaj al la kurdoj, interalie, sed ankaŭ konfirmi la konkerojn de Grekio, kiuj estis *Izmir*, parto de Trakio kaj Norda Epiro. *Mehmet la 6a* alvenis al la regado de la Otomana Impirio en julio 1918 ĵus antaŭ la turka kapitulaco fronte al la aliancanoj, kiuj okupaciis Istanbulon. Anstataŭ rezisti li preferis rezigni, esperante ricevi de la okupaciaj fortoj pli favorajn packondiĉojn. Tiu ĉi pozicio estis sentita kiel perfido, kaj la turka popolo ribelis eksciant la kondiĉojn de la traktato de Sèvres. Tiam *Mustafa Kemal Atatürk*, kolonelo en la turka armeo, ekgvidis la ribelon kaj iom post iom venkis ĉiujn okupaciajn armeojn. Li fondis la Turkan Respublikon la 29an de aprilo 1920. Tiam ŝanĝiĝis la inklinoj de la Aliancanoj. Francio, tiama mandata potenco por Sirio kaj Libano, subite fariĝis subtenanto de la nova turka registaro; la londona registaro, kontenta pri la atribuo de *Mosul* (kun petrolo) al Irako sub brita influo, ne deziris pli. La armenoj venkitaj, same kiel la grekoj, interesis nenium plu. La traktato de Sèvres, neniam ratifita, estis do reviziita en Laŭzano kaj pridiskutita kun la nova turka registaro. La nova traktato precizigis la landlimojn de la nova turka ŝtato kaj organizis translokadojn de popoloj por krei Turkion etne pli homogenan. La traktato de Laŭzano rekonis la leĝecon de la reĝimo de Ataturko instalita en Ankaro. En ĝi la turka registaro rekonis la teritoriajn perdojn de la Otomana Imperio en Kipro, Sirio, Palestino, Ĵordanio, Irako kaj Arabio, sed interŝanĝe rajtis forlasi ĉiujn ideojn pri aŭtonomio por kurdoj kaj armenoj, antaŭviditajn en la traktato de Sèvres. Ĉiujare turkoj kaj kurdoj manifestacias en Laŭzano por rememorigi tiun traktaton kun kompreneble malaj sentoj, kaj la laŭzanaj aŭtoritatoj devas atenti, ke ne okazu surstrataj konfliktoj. En 2005, ekzemple, ili permesis nur surlokajn manifestaciojn, por la

turkoj en *Ouchy*, borde de la lago, kie okazis la tiamaj pridiskutoj kaj por la kurdoj centre de la urbo ĉe la Palaco *Rumine*, kie estis subskribita la traktato. «La kurdoj malbone akceptas, ke oni malpermesis al ili defili ĝis la Kastelo de *Ouchy* kaj ke la aŭtoritatoj permesis turkan manifestacion, en kiu partoprenas turkaj naciistoj venintaj el Turkio» ... Ili vidis tion kiel provokon kaj «timas, ke tiu ĉeesto perturbos la bonan kunvivadon en Svislando inter la du popoloj.» (5) NM

Notoj:

(1) <http://www.hrantdinkodulu.org/>.

(2) La plej granda parto de tiu ĉi prezento venas el la kataluna artikolo de Vikipedio pri *Ismail Beşikçi* kun tamen kelkaj korektoj kaj aldonoj.

(3) Tiuj ĉi informoj venas el la sekva retejo: <http://www.zazaki.net/haber/ismail-besikci-foundation-has-been-established-1056.htm>, laŭ angla traduko proksimuma.

(4) <https://www.letemps.ch/monde/2016/02/12/lausanne-lausanne-un-kurdistan-independant>
<http://www.24heures.ch/monde/Aujourd-hui-lheure-des-Kurdes-a-sonne/story/17449311>

(5) <http://www.institutkurde.org/info/turcs-et-kurdes-manifesteront-dimanche-a-lausanne-1121853507.html>
http://www.lecourrier.ch/112086/les_kurdes_craignent_un_2e_lausanne



Vikimedia. Aŭtoro: Frank and Frances Carpenter Collection.

La turka delegacio sendita al Laŭzano en 1923.

TERITORIA REFORMO EN FRANCIO

laŭ bretona rigardo


Dum la franca revolucio ekde 1789 la jakobenoj (centralizistoj) superfortis la girondanojn (federismajn) (1). Tio influis la historian sekvon.

La centrigita franca respubliko kreis departementojn por lukti kontraŭ malnovaj provincoj (2), tro aŭtonomaj laŭ ĝi.

La jakobenoj estis ideologie centralizismaj: por eviti forgliton al federismo, ili ne kreis koherajn regionojn.

Laŭ Wikileaks 2005, *Michel Rocard*, eks(ĉef)-ministro, opinias, ke Francio kreiĝis detruante kvin kulturojn – la bretonan, okcitanan, alzacan, korsikan kaj flandran. «Ni estas la sola eŭropa nacio, kiu milite kreis ne-homogenan ŝtaton. Tio igas Francion malfacile regebla ĝis la nuna tago. Tio klarigas nian malfacilon reformi, nian malrapidecon» li diris.

La 30-an de junio 1941 la dekreto n°2727 de *Pétain/Darlan* kreis administrajn regionojn, inter aliaj la Rennes-regionon (kun *Ille-et-Vilaine*, *Côtes-du-Nord* (3), *Finistère*, *Morbihan*) kaj la Angers-regionon (kun *Maine-et-Loire*, *Loire-Inférieure* (4), *Mayenne*, *Sarthe*, kaj parto



Vikimedia. Aŭtoro: *Superbenjamin*.

**Situo de la Rennes-regiono
aŭ administra Regiono Bretonio.**

de *Indre-et-Loire*). Oni vidas, ke *Loire-Inférieure* (malnova nomo de *Loire-Atlantique*) estis jam apartigita de Bretonio (Rennes-regiono).

Departemento 44 (*Loire-Inférieure*, poste *Loire-Atlantique*) estas la plej riĉa en Bretonio.

Tial *Pétain* disigis ĝin el Bretonio en 1941, ĉar li timis tro fortan kaj “ruĝan” Bretonion (*Loire-Inférieure* estis la plej industria, do “proleta” bretona departemento).

Kion timas la franca centra registaro? Tro potenca Bretonio (4) eble povus akiri sendependecon.

Same ĉiuj sekvantaj registaroj konfirmis la disigon de Bretonio (kun *Loire-Atlantique* en la administra regiono *Pays-de-la-Loire* (5)).

Tiel la leĝo n°72-619 de la 5-a de julio 1972 kreis administrajn regionojn.



Vikimedia. Aŭtoro: *Eric Gaba*.

Administra Bretona Regiono: la 4 departementoj. La Luantlantika departemento estas ekstere (france kaj bretone).



Vikimedia. Adaptita al Esperanto.

la 22 administraj regionoj de metropola Francio
laŭ la leĝo n°72-619 de la 5-a de julio 1972

KIO OKAZIS PRI TIU ĈI REFORMO?

La reformo *Balladur* neniam estis aplikita.

- Kial?

Jean-Marc Ayrault, tiam urbestro de *Nantes*, postulis de la *Balladur*-komitato, ke la propono inkludigi la departementon *Loire-Atlantique* en la administran regionon Bretonio estu forigita. Sed la malkonsento pri unuigo de Bretonio estas historie pli malnova (de post la Franca Revolucio, de post *Pétain*...).



REFORMO BALLADUR

La prezidento *Nicolas Sarkozy* kreis la 22-an de oktobro 2008 komitaton por la reformo de la lokaj komunumoj, kies prezidanto estis *Edouard Balladur* (iama ĉefministro). La finaranĝoj de la komitato estis prezentitaj la 5-an de marto 2009 al la prezidento.

Kia estis la reformo?

La nombro de regionoj estus reduktita de 22 al 15.

Bretonio, la problemaj regionoj:
Bretonio kaj Normandio retrovus sian unuecon.

La 15 regionoj proponitaj de la komitato *Balladur*



2016 REFORMO HOLLANDE


Jen, ĉi-maldekstre, la mapo de la 12 novaj regionoj krom Korsiko la 1-an de januaro 2016 laŭ Vikipedio (kun la nomoj en la franca kaj en Esperanto).

KION OPINIAS LA BRETONOJ PRI TIAJ REGIONOJ?

Escepte de la normandoj (la du Normandioj estas nun unuigitaj), multaj personoj ne aprobas tiun administran tranĉadon. Ili preferus 15 koherajn regionojn, videblajn sur la mapo (paĝon 14) fare de la bretono *Mikael Bodlore-Penaez-Geobreizh* en 2014: oni povas vidi Alzacon, kiu retrovus sian identecon, unuigitan Bretonion kaj aŭtentan regionon *Val-de-Loire* (5).

TERITORIA REFORMO 2014 15 koheraj regionoj

Homaj spacoj,
kulturaj
kaj ekonomiaj,
je la servo
de la civitanoj
kaj de prospero



LA BRETONOJ MALKONSEN- TAS PRI TIAJ REGIONOJ


a) La 27an de septembro 2014
30 000 personoj manifestaciis en
Nantes por la reunigo de Bretonio.



b) **“Bretagne Réunie - Breizh Unvan”**: La ĉefa asocio, kiu aktivas por reunigo de Bretonio, estas **Bretagne Réunie – Breizh Unvan** (reunuiĝonta Bretonio), antaŭe konata kiel **Comité pour l’Unité Administrative de la Bretagne (CUAB)** (Komitato por Administra Unueco de Bretonio). Ĝi estis kreita en 1980 (post iniciatoj kiel *“Nantes en Bretagne”* 1960 kaj *“B5”* 1973). Ĝi estas federacio de asocioj kaj de individuaj membroj kun

15 administraj regionoj laŭ la propono de la bretono **Mikael Bodlore-Penaez-Geobreizh** kun nomoj en la franca, (p. 13).

Ĉi sube: mapo de postulitaj okcidentaj regionoj (Escepte de Normandio, kiu estis reunuigita la 1-an de januaro 2016). La regiono *Pays-de-la-Loire* estus forigita. La departementoj, kiuj konsistigis ĝin, enirus aliajn regionojn: nro 44 (*Loire-Atlantique*) en la regionon Bretonio, 85 (*Vendée*) en la regionon *Poitou-Charentes*, nroj 49 (*Maine-et-Loire*), 53 (*Mayenne*) kaj 72 (*Sarthe*) en la regionon *Val-de-Loire* (5):



regionisma sentemo, kies celo estas la kunigo de la departemento *Loire-Atlantique* (nun en la regiono *Pays-de-la-Loire*) kun la regiono *Bretagne*. La nuna prezidanto estas *Jean-François Le Bihan*. Ĉiujare, la 30-an de junio, okaze de la datreveno de la dekreto de *Pétain*, (vidu p. 12) *Bretagne Réunie* organizas manifestacion ĉe la prefektejoj kaj subprefektejoj de tuta Bretonio por postuli administran reunuigon de Bretonio.

c) **War ar pont**: Por postuli reunuigon de Bretonio, aktivuloj organizas la unuan sabaton de ĉiu monato manifestacion nomatan *“war ar pont”* (sur la ponto). Ili kunvenas sur pontoj de la kvin bretonaj departementoj.



d) **“Breizh 5/5”**: Tregora (6) asocio *“Breizh 5/5”* eldonas propagandan ilaron:

<http://www.kisskissbankbank.com/breizh-5-5>



e) **“Gwenn ha Du”**: Laŭ Vikipedio, tiu moderna bretona flago (7) estis kreita de *Morvan Marchal* en 1923.



La ermenoj ĉe la supro maldekstre estas la simboloj de la pasintaj gedukoj de Bretonio.

La 9 horizontalaj strioj aludas al la 9 landoj (aŭ diocezoj) de Bretonio; 4 por la landoj de okcidenta bretonlingva Bretonio: *Bro-Dreger* (*Trégor*), *Bro-Gerne* (*Cornouaille*), *Bro-Gwened* (*Vannes*) kaj *Bro-Leon* (*Léon*); 5 por la landoj de orienta galolingva Bretonio: *Bro-Sant-Brieg* (*Saint-Brieuc*), ***Bro-Naoned*** (***Nantes***), *Bro-Roazhon* (*Rennes*), *Bro-Sant-Maloù* (*Saint-Malo*) kaj *Bro-Zol* (*Dol*).

Oni povas rimarki, ke, sur tiu flago, oni trovas la nigran strion de la lando de *Nantes* (*Loire-Atlantique*).

f) **Kolektivo “Bretona en mia TV”**: En televido de publika servo, programoj en la bretona ne elsendiĝas ekde 2002 en *Loire-Atlantique*, pretekste, ke tiu departemento ne estas en la administra regiono Bretonio. Laŭ *Patrick Lecat*, estro de la kolektivo “Bretona en mia televido”, kiu aktivis por la reveno de programo en la bretona sur *France 3 Pays-de-Loire*, «la loĝantaro de *Loire-Atlantique* havas la samajn rajtojn (8) kiel la bretona loĝantaro».

La bretonoj demandas sin, kial la francoj tiom timas ilin, ke ili malpermesas la integrecon de ilia teritorio.

KIAL REUNUIGI?

Bretonio estas en periferio de la eŭropaj ĉefaj vojoj (vidu mapon apude). Ĝia estonteco (kiel ĝia estinteco) estas mara.

Reunuiĝo ebligis la formadon de ununura asembleo en Bretonio por lasi bretonojn elekti sian ekonomian politikon en la kvin departementoj, prefere al politiko decidita en Parizo. La lokaj agantoj decidus veran ekonomion direktitan al la maro kaj ne plu permesus, ke Bretonio estu periferio nur agrikultura (kiel multaj nedisvolviĝintaj landoj).

DH Saint-Nazaire / Sant-Nazer, Bretonio

Notoj:

(1) Pri historio de Bretonio oni povas legi artikolon je:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Bretonio>

(2) Malnova nomo: *Côtes-du-Nord*. Nova nomo: *Côtes-d'Armor*.

(3) Malnova nomo: *Loire-Inférieure*. Nova nomo: *Loire-Atlantique*.

(4) Reunuiĝita Bretonio havus la saman dimension kiel Danio.

(5) La artefarita administra regiono “*Pays-de-la-Loire*” (Lŭarlandoj) kreita en 1955, oficialigita de la **ministra dekreto de la 28-a de novembro 1956** (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Luarlandoj>) estas malsama ol la aŭtenta historia regiono “*Val-de-Loire*” (Lŭarvalo), agnoskita de UNESKO kiel monda komuna havo (<http://www.valdeloire.org/>).

(6) Tregoro: bretone “*Bro-Dreger*”, landa de norda Bretonio kun urboj *Tréguier/Landreger*, *Lannion/Lannuon*, *Morlaix/Montroulez*, *Perros-Guirec/Perroz-Gireg*, *Guingamp/Gwengamp*... (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Tregoro>).

(7) https://eo.wikipedia.org/wiki/Flago_de_Bretonio

(8) Laŭ la Bretona Kultura Ĉarto konfirmita la 4-an de oktobro 1977 kaj la Eŭropa Ĉarto por la Regionaj aŭ Minoritataj Lingvoj (9) (ne ratifita ankoraŭ sed promesita de la registaro *Hollande*).

(9) https://eo.wikipedia.org/wiki/Europa_Carto_pri_la_Regionaj_kaj_Minoritataj_Lingvoj.



BERTA CÁCERES, murdita pro sia batalo

Ĵaŭde, la 3an de marto 2016, du homoj eniris la domon de *Berta Cáceres* kaj mortigis ŝin per ok pistolaj pafoj.



Vikimedia.

Aŭtoro: *Goldman Environmental Prize*.

Berta Cáceres en 2015 intervjuita en vidfilmo.

Berta Isabel Cáceres Flores naskiĝis en *La Esperanza* la 4an de marto 1973. Ŝi fariĝis gvidanto de la lenka (1) popolo kaj kunfondis, la 27an de marto 1993, la *Consejo Cívico de Organizaciones Populares e Indígenas de Honduras (COPINH)*, Konsilion de Popolaj kaj Indiĝenaj Organizaĵoj de Honduro, kiu celis la defendon de la lenka kulturo kaj de ties naturmedio. Ekde 2006 ŝi engaĝiĝis protekti la riveron *Gualcarque*, sanktan por la lenka popolo kaj minacatan de la hidroelektra projekto *Agua Zarca*. Pro tiu ĉi lukto ŝia vivo estis minacata. La familio de *Berta Cáceres* aperte akuzas la honduran registaron kaj la firmaon, kiu projektas la hidroelektran baraĵon en *Agua Zarca*, pri persekuto kaj organizo de la murdo. Amnestio Internacia esprimas skeptikon pri la enketo, kies «mankoj evidentigas la kompletan nevolon de la hondura registaro protekti la defendantojn de homrajtoj.» Svisa esperantistino, *Verena Chaves*, sin engaĝinta por la defendo de la homaj rajtoj en Sudameriko, havis la okazon renkonti *Berta Cáceres* kaj ĉi-sube rakontas tiun renkonton al ni.

Diversaj fontoj:

artikolo en *Le Monde*, en *La Manifesto*, en Vikipedio.

NdR

En oktobro 2013 mi havis la tre specialan okazon partopreni en svisa delegacio vojaĝanta al Honduro por viziti diversajn ŝtatajn kaj neŝtatajn organizaĵojn en tiu danĝera lando, kie la nombro de perforte malaperigitaj kaj murditaj personoj estas unu el la plej altaj en la mondo.

La 6an de oktobro nia celo estis *La Esperanza* (la Espero) (2), kie ni sukcesis havi kontakton kun la agronomia kaj kultura centro de la lenka popolo. Tre kompetente ni estis informitaj de la indiĝenaj viroj kaj virinoj pri sukcesoj kaj obstakloj en sia ĉiutaga laboro planti kaj kultivi, nutri sian familion, kaj flegi sian kulturon. Sur la muroj vidiĝas impresaj pentraĵoj, kiuj montras ke vivo estas ankaŭ kulturo. Unu el la ĉefaj lenkaj gvidantoj estas *Berta Cáceres*, mem apartenanta al la lenka popolo. Ŝia engaĝiĝo favore al la indiĝena popolo instigas kontraŭulojn al atako kaj persekutado.

Dum nia vojaĝo ni sciigis, ke *Berta Cáceres* nun troviĝas en malliberejo. Malgraŭ tio ni renkontiĝas kun aliaj aktivuloj de la lenka popolo, kiuj neniam scias ĉu la venontan tagon ili ankoraŭ vivos en libereco. Tial ni invitas Mario, unu el ili, manĝi kun ni ĉe la ĉefa placo de la urbo *La Esperanza*. Ni amike adiaŭas lin. Evidentas, ke pro tiu renkonto kun internaciaj amikoj oni ne tiel facile malliberigos lin. Posttagmeze ni havas la ĝojon konatiĝi kun la patrino de *Berta Cáceres*, iama akuŝistino kaj dufoje elektita urbestro de *La Esperanza*. Ŝi kore invitas nin al la ekstera korto de sia domo. Ŝi ĝojas pri nia intereso kaj rakontas pri sia eventoplena vivo. Baldaŭ poste ŝi tuj malaperas kaj revenas kun sia filino *Berta*. Tra ŝiaj rakontoj ni malkovras fortan virinon kun ambaŭ piedoj en la reala vivo kaj plenenergie sinengaĝitan en siaj diversaj bataloj. Dank' al konatoj, *Berta Cáceres* ne troviĝas malantaŭ muroj, sed ta-



Fotis: Verena Chaves-Walder.

De maldekstre: Berta Cáceres, ŝia patrino, la svisa gvidanto de la delegacia grupo.

men en doma mallibereco. *Berta Cáceres* kun saĝeco prezentas la tiklan situacion de sia lando kaj la engaĝigon de la lenka popolo favore al la naturmedio kaj al homaj rajtoj de indiĝenaj viroj kaj virinoj. Pere de ŝiaj spertoj ni nun konas la veran Honduron, kies registaro apogas precipe la interesojn de la potenculoj. Kontraŭuloj estas malaperigataj kaj senrajteco regas.

Antaŭ nia hejmenflugo el *San Pedro Sula* mi havis la ĝojon renkonti esperantiston. Forte li suferas pri la senespera nejusteco en sia lando. Mi mem bedaŭras la malesperon, kiu regas en la granda plimulto de la hondura popolo.

Du jarojn kaj duonon post nia impresa renkontiĝo kun *Berta Cáceres* atingas nin la terura fakto, ke tiu netimigebla virino estis murdita.

Miloj da konsternitaj geamikoj akompanis ŝin dum la funebra ceremonio. Dankon, *Berta Cáceres*, pro via kuraĝa engaĝiĝo favore al la homaj rajtoj en via lando, al kiu ni finfine deziras justecon kaj respekton por ĉiuj.

V C-W

Notoj:

(1) «La lenkoj estas etna grupo de Centrameriko. kiu havas sian propran lingvon kaj kiu okupis parton de la teritorio de la nunaj Honduro kaj ekde antaŭkolumbaj tempoj. (...) Hodiaŭ la lingvo estas formortinta, sed la lenkoj de Honduro estas pli ol 100.000 personoj, kaj tiuj de Salvadoro estas pli ol 37.000 personoj.» El Esperanto-Vikipedio. NdR

(2) *La Esperanza*, unuigita al la urbo *Intibucá*, estas ĉefurbo de la samnoma distrikto. La municipo *Intibucá*, la plej malnova el ambaŭ, origine estis lenka komunumo kaj fakte kundividis la teritorion kun la majaoj. *La Esperanza* estas pli nova kaj hispankultura. Ĝi ricevis la statuson de urbo en 1883. El la anglalingva Vikipedio. NdR

Por kompletigi tiun ĉi artikolon ni konsilas la legadon de alia, aperinta en la franclingva gazeto *Le Monde Diplomatique* kaj tradukita en Esperanton:

“Berta Cáceres, politika krimo”

de *Ignacio Ramonet* (02.04.2016):
<<https://eo.mondediplo.com/article2349.html>>. NdR

MIAJ SPERTOJ PRI LA REJNA FRANKONIA LINGVO

La naciaj lingvoj plej ofte estas parolataj en la limoj de ŝtato aŭ de certa regiono. Alia afero estas la dialektoj, por ili landa limo ne estas lingva limo.

Mi naskiĝis en Sarlando, en la vilaĝo *Ommersheim*, kiu estas parto de la komunumo *Mandelbachtal*. En Sarlando, dum mia infaneco, la homoj ĝenerale parolis, aŭ plu parolas *moselfränkisch* kaj en la suda parto *rheinfränkisch* (1). Mi mem parolis tiun reinfrankonian dialekton ĝis mia eniro en la baza lernejo; ĉiuj infanoj eklernis kaj eklernas paroli la altgermanan ekde la bazlernejo. Sed ĝis hodiaŭ estas tiel, ke la homoj parolas dialekton kaj nur kiam ili estas en la ĉefurbo kaj parolas tie kun fremduloj aŭ kun oficistoj en la administracio ili uzas la altgermanan.

Post la lernejo mi translokiĝis al Frankfurto ĉe Majno, kie mi al kutimiĝis paroli nur la altgermanan. Kiam mi vizitis, de tempo al tempo, amikojn en mia vilaĝo en Sarlando, mi kompreneble ankoraŭ nun parolas tiun dialekton.

Nun kiel esperantistino mi ofte vizitas eksterlandajn renkontiĝojn. La pasintan jaron mi partoprenis la “Printempan

migradan semajnon” en Diĵono, Francio. Tie mi estis la sola germanino, mia kunloĝantino estis francino. Ni interparolis kaj rakontis, kie ni hejme loĝas kaj kiam ni esperantiĝis ktp. Mi rakontis, ke mi naskiĝis en Sarlando, en vilaĝo proksime nur ca. 20 km de la franca limo.

Subite tiu francino diris al mi franzon en tiu dialekto mem, kiun mi parolis dum mia infaneco! La sama prononco kaj la sama melodio. Surprizite mi demandis ŝin, kio kaŭzis tiun parolkapablecon, ŝi respondis, ke dem ŝia infaneco ŝi ofte vizitis parencojn vivantajn en Francio, en la vilaĝo *Merlebach*, ankaŭ tute proksime de la landlimo. En la du flankoj de la limo inter Francio kaj Germanio la loĝantoj parolis la saman dialekton. La francoj nomas ĝin *francique*. Parolis tiel, ĉar post la dua mondmilito, en Francio, la uzado de la dialekto estis malpermesita en la lernejo.

Regule aperas magazino, “*Nemmeh dehemm*” (esperantlingve: “Ne plu hejme”), por sarlandanoj, kiuj ne plu loĝas en Sarlando kaj interesiĝas pri la historio, kutimoj kaj lingvo de tiu regiono. En tiu ĉi magazino estis publikita, inter alie rakonto de verkisto, *Jean-Louis Kieffer*, en kiu li klarigis kiel la francaj instruistoj post la dua mondmilito, devigis la gelernantojn forgesi la “frankonian dialekton” por lerni kaj uzi nur la francan. (Tiu rakonto estas skribita en *moselfränkisch*.)

Sed nun en Francio oni denove persas uzi tiun lingvojn. Kelkaj kluboj esti fonditaj por aktivigi la uzadon de la lingvo; unu el ili, en *Bouzonville*, nomiĝas “*Gau un Griis*” kaj festis ĝian tridekjaran ekziston; ĝi eldonas la gazeton “*Paraple*”. La membroj de tiu klubo el Francio kaj Germanio okupiĝas pri la historio de tiu dialekto. En 2015 okazis en *Sarreguemines* (Francio) la “*Mundartfestival*” (*Mir redde platt*). Franca verkistino tradukis “*Le Petit Prince*” kaj kelkajn fabelojn en tiun frankonan dialekton. **HS**

Notoj:

(1) La lingvoj kaj dialektoj frankoniaj estas ĝermana lingva grupo apartenanta samtempe al la malalta, meza kaj alta germano. Ĝi ŝuldas sian nomon al la frankoj kaj la lingvoj de tiu ĉi grupo parolatas en la nord-orienta parto de la antaŭa Franka Reĝejo. (Pri la historio de tiu lingvo kaj ties Imperio ekzistas detalaj artikoloj en Vikipedio titolitaj “Frankonio” kaj “Malnovfranka lingvo”.) NdR.



Vikimedia. Aŭtoro: *Damien*. Adaptita al Esperanto.

La frankoniaj lingvoj.

KONCIZE EL ...

Svisaj deputitoj proponas mediacion inter Madrido kaj Barcelono. Sin turnante al la Federacia Konsilantaro (plej alta ekzekutiva instanco de la alpa lando) kvin deputitoj el malsama partioj demandis, ĉu Svislando pretus roli kiel mediacianto inter Katalunio kaj Hispanio dum la procezo de sendependado, kiun la registaro de la Generalitato decidis lanĉi. Ili emfazis, ke Svislando estas neŭtrala lando kun multaj spertoj en internacia traktado. La Federacia Konsilantaro respondis, ke la «emoj al sendependado de Katalunio koncernas nur la internan politikon de Hispanio». Sed, kaze de akriĝo de la situacio inter Barcelono kaj Madrido, la helpo en diskutoj de tria flanko povus esti necesa. Kaj oni povas aldoni, ke pli taŭgus, se tiu arbitrado troviĝus ekster la Eŭropa Unio, kiu tutcerte favoras unu flankon (la leganto facile divenos, pri kiu temas). Ĉar tiaj konfliktoj riskas multiĝi - ni pensu interalie pri Flandrio kaj Skotlando - tute eblas, ke Svislando tiel trovos novan kaj eĉ prestiĝdonan agokampon, spite al la malfacilo de la tasko.

El katalunaj fontoj – marto 2016



El: <http://www.lenouvelliste.ch/photos>.

Meze Bernard Borner, antaŭa kantona konsilanto, nuna prezidanto de la "Fondation du patois" kaj inicanto de la unua meso en la arpitana.

Svislando – unua meso en la arpitana. En la katedralo de *Sion*, ĉefurbo de la kantono Valezo, la 10an de aprilo okazis la unuan fojon meso tute en la loka lingvo – nomata arpitana aŭ francprovenca. Multaj kantoj estis komponitaj por tiu okazaĵo. La konstruaĵo plenplenis, iuj ne sukcesis eniri. Ĉiu pastro uzis la propran dialekton. Post tiu solenado fama blanka vino *Fendant* estis proponita al la ĉeestintoj sur placo plenŝtopita, en kiu radiodungitoj intervjuis la homojn en la loka lingvo; en la homamaso troviĝis politikistoj, lingvistoj, kaj entute ne nur valezanoj: kelkaj venis el Vaŭdo, Friburgo, Savojo, eĉ el la fora Liono. La loka episkopo sciigis, ke li esceptokaze donis la permeson fari meson en la arpitana, sed pro la neantaŭvidita sukceso kaj tutcerta reveno de iamaj praktikantoj, oni povas esperi, ke

sama evento baldaŭ okazos, ankaŭ en aliaj urboj de Arpitano. AF



Vikimedia. Aŭtoro: *Vermondo*.

Trilingva bonvena ŝildo, araba, tamaziga, franca: «La municipo Isser deziras al vi la bonvenon.»

Alĝerio - la tamaziga iĝas oficiala lingvo. Promulgita la 7an de marto, la nova konstitucio de la alĝeria respubliko agnoskas la tamazigan (berberan) kiel oficialan lingvon, apud la araba. Tiu konstitucio celas al demokratigo de la lando; ĝi jam estis promesita antaŭ kvin jaroj, en la tempo de la «arabaj printempoj». De jardekoj la tamazigoj, kiuj konsistigas plimulton en pluraj regionoj, luktis cele al la oficialigo de sia lingvo. Akademio devos okupiĝi pri la tamaziga, cele al ties antaŭenigo; tiu instanco verŝajne havos la taskon trovi komunan skribmanieron. Oni jam povas imagi, ke tio postulos multe da tempo kaj transpason de diversspecaj obstakloj. Tamen jen grava progreso, eĉ se tiu konstitucio plu emfazas la ĉefan rolon de la araba – kiu nun disponas pri «alta konsilantaro» – kaj aldone konfirmas la islaman karakteron de la lando. AF

Nagorno-Karabaĥo - ekflamo de milito. En la lasta (96) numero de *Etnismo* ni longe elvokis tiun pli ol dudekjaran konflikton inter Azerbajĝano kaj ties ribela provinco Nagorno-Karabaĥo, loĝata de armenoj kaj subtenata de Armenio. Tio, kion ni timis, ja okazis: la milito restartis. Plej verŝajne Azerbajĝano atakis, profitante la malboniĝon de la rilatoj inter Rusio kaj Turkio. Inter la 1a kaj la 4a de aprilo, proksimume cent homoj mortis. Batalhalto okazis pro premo de Rusio kaj Usono. Oni povus kredi, ke la situacio refariĝis sama kiel antaŭ la 1a de aprilo. Eble ne: la turka prezidento deklaris absolutan subtenon al Azerbajĝano, kiu eble fortikigis poziciojn sur la krestoj. Armenio akuzis Israelon, ke ĝi vendas armilojn kaj dronojn al azeroj. La azerbajĝana diktatoreca prezidento konservas bonajn rilatojn kun okcidentaj landoj. Tute eblas, ke kaze de nova ekmilito, Usono (kun nova prezidento) kaj Eŭropa Unio (ema je ĉia submetiĝo al Turkio) nur tre mole reagu. Ĉu nova armena genocido atendeblas? AF



INFORMILO 77
Internacia
komitato
por
Etnaj
Liberecoj,
Honora prezidanto:
Uwe Joachim Moritz

PRELEGO PRI IKEL EN CDELI

La Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en *La Chaux-de-Fonds*, invitis min paroli pri “Etnismo kaj etnaj liberecoj”, la 5an de marto 2016, dum Kleriga Sabato, kiu kunigis entute tri prelegojn. Mi kundividis la tempon kun *Claude Gacond*, demandante sin “Ĉu Esperanto progresas?” Kaj *Mireille Grosjean*, kiu rakontis pri “ILEI, tutmonda Ligo kun gigantaj taskoj”. Ĉirkaŭ dekkvin ĉeestantoj aŭskultis pri la historio de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, pri la kialo de ĝia ekesto kaj pri la nocio “etno” kaj “etnaj liberecoj”. La pretigo de tiu ĉi prelego devigis min relegi la bazajn tekstojn aperintajn en la unuaj numeroj de *Etnismo*. La tasko estis tre instruiga kaj mi instigas membrojn de IKEL, kiuj same al mi ne travivis tiun pioniran epokon, legi tiun ĉi kompiladon kaj, ĉu travivintaj, ĉu ne, eventuale ĝin komenti en nia gazeto per leteroj de legantoj. La tuta teksto de la prelego aperos fine de aŭgusto en la retaj Kulturaj Kajeroj eldonitaj de CDELI sur ties retejo: <http://www.cdeli.org/kulturaj-kajeroj>.

Pro tempa limigo, mi tamen ne eniris ĉiujn punktojn de la teksto sed insistis pri la kialo de la naskiĝo de IKEL, elirinta el “Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj (AIDMLK)”, kiu ja prenis esperanton por nomi sin, sed ne kiel laborlingvon. Same kiel UEA en tiu epoko la membroj de tiu asocio ne komprenis la evidentajn ligojn inter defendo de senŝtataj popoloj kaj internacia lingvo, politike neŭtrala, t. e. ne ligita al iu naciŝtata potenco.

Mi ankaŭ insistis pri la nocio etnismo, ofte malbone komprenata. Se mi aludis la kreon de la vorto far *Ferdinand de Saussure* kaj ĝia posta uzo, mi preferis halti je tiu de *U. J. Moritz* kaj poste *Marcel Cortiade* (1), kiuj dank’ al esperanto evitis nacieman koloron.

La Deklaracio por Etnista Humanismo verkita de *Daniele Vitali* montriĝis aparte adaptita por komprenigi la gravecon de etnaj liberecoj en nia nuna mondo kaj ŝajnis konvinki la aŭskultantojn.

Por mi la grava demando, kiu estiĝis dum la preparo de tiu prelego estis: ĉu ni, nunaj IKEL-anoj, plenumas la programon de niaj antaŭuloj. Ja, ni povas fieri, ke IKEL regule produktas gazeton ekde majo

1972 kaj povis daŭre trovi estraranojn kun prezidanto kaj kasisto, necesaj al la pluvivo de la asocio. Sed la produkto de la gazeto okupas preskaŭ ĉiuj niaj fortoj. IKEL ja bezonas pli da agemaj fortoj.

Ni ankaŭ unuanime konstatis, ke ekde la kreo de IKEL, la celoj de UEA proksimiĝis al tiuj de IKEL. **NM**

Noto:

(1) “Difino de Etna identeco”, eld. IKEL, (elĉerpita)



Fotis *Mireille Grosjean*.

IKEL EN LA UNIVERSALA KONGRESO

En Nitro nia asocio estos plej videbla en du okazaĵoj:

Movada foiro: (23-a de julio, inter la 19a kaj la 21a horoj). *Nicole Margot* (KN 780), *Alain Favre* (KN 781) kaj *Xabier Rico Iturriotz* (KN 165) prezentos la asocion en tiu nun tradicia kaj homplena aranĝo. Aliaj membroj estos tre bonvenaj por deĵori en nia budo, normale abunde vizitata.

Faka kunveno: Ĉijare ne okazos administra parto. Ni do dediĉos nian horon al plena etnisma temo. Tial ni invitis Prof. *Eva Poláková*, kiu okupiĝas pri esplorsciencaj problemoj de marĝenaj sociaj grupoj rilate al obeado de leĝoj pri homaj rajtoj. Por ni ŝi prelegos pri **MINORITATOJ EN SLOVAKIO**, ĉefe pri hungaroj (proksimume 10 % de la loĝantaro) kaj romaoj (oficiale pli malpli 2 %, sed en la realo eble 8 % de la loĝantaro). Ŝi interalie tuŝos la temon de la apliko de leĝoj, kiuj entute povus esti sufiĉaj por garantii la rajtojn de la minoritatoj, sed en praktiko ne ĉiam estas kontentige uzataj. La tagon kaj horon de tiu prelego oni trovos en la kongresa libro.

AF



Prof. Eva Poláková, kiu prelegos dum nia faka kunveno en la venonta Universala Kongreso.